

**نام مقاله :** امام خمینی ، نوری در ظلمت Imamo Homejni,Lumo en Obskureco

**نام مجله :** بولتن اسپرانتودانان جوان ایران IREJO – Bulteno

**نویسنده :** علی اصغر کوثری ( نام نویسنده از قلم افتاد بنابراین در شماره ی بعدی یعنی شماره ی دهم آورده شده است )

**شماره :** ۹

**تاریخ انتشار :** خرداد و تیر ۱۳۷۴

**تعداد کل صفحات :** ۱۲

**صفحات این مقاله :** ۱۰ و ۱۱

**زبان :** اسپرانتو

**خلاصه ی مطلب :** مقاله ای ۳ صفحه ای در مورد زندگانی امام خمینی (ره) به مناسبت ششمین سال ارتحال . این مقاله احتمالاً

نخستین مطلب در مورد زندگانی امام خمینی ( ره ) به زبان اسپرانتوست.

**نحوه ی دسترسی :** به عنوان مشترک ، این بولتن از سوی سازمان اسپرانتودانان جوان ایران به اینجانب پست گردید.

**سازنده ی نسخه ی الکترونیکی :** اسکن نمودن از نسخه ی کاغذی و تهیه نسخه ی دیجیتال توسط علی اصغر کوثری

**سپاس :** سبز اندیشان

**کتاب شناسی اسپرانتو در ایران**

[www.bibliografio.parsiblog.ir](http://www.bibliografio.parsiblog.ir)

همراه : ۰۹۱۸۳۳۸۶۵۹۰

کنگاور- ص پ ۱۹۶-۶۷۴۱۷

# IREJO - Bulteno

Informilo de Irana Esperantista Junulara Organizo

N-ro : 9

Junio - Julio 1995

Ĥordad - Tir 1374

IREJO

IREJO

4an IREJO renkontiĝo

19.05.1374

10.08.1995

Jara Ĉefkunveno

IREJO

IREJO

علی اصغر کوثری

## Okazo de la forpaso de Imamo Ĥomejni

*Okaze de la 14an de Ĥordad , la 6a datreveno de la forpaso de Imamo Ĥomejni*

**Imamo Ĥomejni , lumo en obskureco**

Je la nomo de Dio.

Imamo Ĥomejni-(1) la fondinto de "Islama respubliko de Irano"-estas fama nomo en tuta mondo, speciale ĉe Islamanoj.

Li naskiĝis date la 1an de mehr 1281(2) en la urbo "Ĥomejn", Ĥomejn situas en la "centra provinco". la naskiĝtago de Imamo Ĥomejni koincidis kun la datreveno de naskiĝtago de "Házrát fatemeh záhra"(3).

La patro de Imamo Ĥomejni "sejjed Mostáfa Musávi"estis "Islama teologo". Tiam , kiam Imamo Ĥomejni estis nur 5 monata infano, lia patro "Mostáfa"martiriĝis.

Imamo Ĥomejni lernadis Elementan studadon en sia urbo Ĥomejn. Post la Elementa studado , kiam Imamo Ĥomejni estis 14 jara junulo , li veturis al la urbo "Árak"(4), En la urbo Árak li daŭrigis sian studadon en la "Religia scienco". En la jaro 1300(5) , S-ro "Ajátollah Haeri"(6), en la urbo "Gom"(7) fondis "la Granda religia lernejo"n. Imamo Ĥomejni veturis al la urbo "Gom" post la fondiĝo de "la Granda religia lernejo". En la urbo "Gom" li daŭrigis sian studadon pri la Islamaj sciencoj.

En la jaro 1308(8), Imamo Ĥomejni edziĝis. lia unua infano nome "Mostáfa", Martiriĝis dum la Islama revolucio.

Imamo Ĥomejni ne nur estis granda Islama scienculo kaj muftio, sed ankaŭ granda revoluciulo.

En iu tempo en Irano regis "Reĝa reĝimo". La reĝo de Irano nome "Páhlávi"estis diktatora reĝo. Li estis diboĉema reĝo kaj tre kruela , la "Reĝa reĝimo"ne nur ne respektis al Islamo, sed ankaŭ estis malamiko de Islamo kaj Islamanoj. Tial la Islama popolaro de Irano gvide de Imamo Ĥomejni ribelis kontraŭ la antiIslama kaj diktatora reĝreĝimo.

Tago post tago, la manifestacioj kaj la strikoj pli grandigis ol antaŭaj tagoj. La reĝimo ekzilis la Imamon al Irako kaj poste al Francio , sed li ne lasis for la bataladon kontraŭ la diktatoro, kaj gvidis la revolucion en ekzilejo. Fine la Islama revolucio venkiĝis kaj la reĝa

## Okazo de la forpaso de Imamo Ĥomejni

reĝimo renversiĝis. La 26 an de Dejo 1357<sup>(9)</sup> la reĝo forkuris al Egiptujo, kaj Imamo Ĥomejni post 15 jara ekzilo revenis al Irano en la dato 12an de Báhmán 1357<sup>(10)</sup>. Dek tagojn post la reveno de la Imamo al Irano, t.e. la 22an de Báhmán<sup>(11)</sup> la Islama revolucio tute venkiĝis kaj la reĝa reĝimo tute renversiĝis. Tial la 22an de Báhmán estas la venkiĝtago en Irano kaj ĉiu jare oni festas tiun tagon. Ankaŭ la intertempo de 12an ĝis 22an de Báhmán nomiĝas "la tagdeko de aŭroro". Post la renversiĝo de la reĝa reĝimo, fondiĝis en Irano "Islama respubliko" kaj Imamo Ĥomejni elektiĝis kiel la estro de "Islama respubliko de Irano".

sed .... post kelkaj tagoj malsane enlitiĝo, date la 14an de Ĥordad 1368<sup>(12)</sup> Imamo Ĥomejni ĉieleniris kaj migris al la Dio. La Islama mondo kaj Irano tute funebriĝis, ĉar ili perdis grandan ŝijaistan<sup>(13)</sup> muftion kaj erudita estro. En lia funebra ceremonio partoprenis milionoj da homoj. Nun lia maŭzoleo en Tehrano<sup>(14)</sup> estas la sanktejo de la amantoj de la Imamo kaj Islamo.

Imamo Ĥomejni ĉieleniris, sed lia memoraĵo-t.e. Islama respubliko de Irano-ĉiam eternos.

Imamo Ĥomejni havas multajn mistikajn poemojn. Lia Dia polotika testamento plenplenas de mistikaj enhavoj. Krom mistikaj poemoj kaj Dia polotika testamento, el la Imamo restas kelkaj aliaj verkoj.

Ekzemple la libroj de "la komentario de la surao Hámd"<sup>(15)</sup>, "la sekreto de la preĝo", "la mesaĝo de la revolucio", "plejgranda sankta milito", "la temo de juĝado", "komentario pri la preĝo de frumateno", "la eltrovo de la sekretoj", "teologa kuratoreco". ktp.

La pensoj de "sinjoro Ajátollah Ruhollah musávi Ĥomejni" tute estis Islamaj. Li forte subtenis malriĉulojn kaj subprematojn. Li tre penis por revivigi la veran Islamon kaj unuecigi tutajn musulmanojn en tuta mondo. Imamo Ĥomejni vivis tre simple. Li loĝis en malgranda kaj simpla domo. sed la reĝoj loĝas en grandaj domegoj.

Post la ĉieleniro de Imamo Ĥomejni, oni elektis "Ajátollah Ĥamenei" kiel lia postulo kaj la estro de "Islama respubliko de Irano". Nun la estroj de Irano kaj la popoloj de la lando, sekvas la vojon de Imamo Ĥomejni.

## Okazo de la forpaso de Imamo Ĥomejni

### "La klarigoj"

- 1- La kompleta nomo de Imamo Ĥomejni estas "Ajátollah Ruhollah musávi Ĥomejni " kaj "Imamo" estas titolo por Islamaj regantoj.
- 2- La 23 an de septembro 1902 p.k.
- 3- Ŝi estis la filino de s-ro mohámmád (B.d.) la profeto de Islamo.
- 4- "Árak" estas la centro de "centra provinco".
- 5- La jaro 1921 p.k.
- 6- Ajátollah estas titolo por plej grandaj Islamaj teologoj.
- 7- Ĝi estas sankta urbo en la provinco Tehrano.
- 8- La jaro 1921 p.k.
- 9- La 16an de januaro 1978.
- 10- La 1an de februaro 1978.
- 11- La 12an de februaro 1978.
- 12- La 4an de Junio 1989.
- 13- En Islamo ekzistas kelkaj religibranĉoj , unu el ili estas ŝijaismo.
- 14- La ĉefurbo de Irano.
- 15- La Nobla korano- la sankta libro de Islamanoj- havas 114 suraojn , unua nomas Hámd.

### *Printempa Kunveno en Tehrano*

25 Teheranaj geesperantistoj la 14an de ordibeheŝt (4an de majo) kunvenis en la IREJO sidejo.

Dudek el la partoperenantoj por unua foje vizitis la sidejon kaj ili proksime konatiĝis kun la IREJO aktivuloj. Inter la partoperenantoj S-ro Golam Reza Azár-Huŝáng kaj lia edzino S-ino Kárimi rimarkindas. Oni en la kunsido diskutis pri la bezoneco de propra biblioteko kaj decidis fondi la IREJO bibliotekon kaj S-ro Azár-Huŝáng promesis elsubteni la aferon.

## — Bazaj informoj pri AIS —

uzas kiel nomon de la zamenhofa lingvo ne la pseŭdonimon de la iniciatinto sed la originalan nomon “Internacia Lingvo” ofte mallongigite per “I.L.” aŭ “ILO”.

### ***Kiel ekestis AIS?***

Pro instigo de sciencistoj el la “Eŭropa klubo” la sanmarina ministrino pri klerigo kaj kulturo, Fausta Morganti, prezentis proponon pri starigo de la Akademio, kiun la “Congresso di Stato” per sia decido n-ro 58 favore prijuĝis la 19-an de majo 1983. La iniciatgrupo AIS de Eŭropa klubo preparis la unuan Sanmarinan Universitatan Sesion (SUS 1), per kiu la scienca laboro de AIS fakte jam en 1983 komenciĝis, kaj dum kiu establiĝis la Internacia Scienca Kolegio (ISK) plenumanta ĉi sciencan labron. La 13-an de septembro 1985 okazis la oficiala fondo de AIS per ĉeadvokata subskribo de la statuto, kaj la 31-an de oktobro 1985 (“1985 post la fondo de la Respubliko”) la Granda kaj Generala konsilo de la Respubliko de San Marino aprobis la kadroleĝon pri la universitata instruado kaj institucioj de altgrada klerigado kiu ebligas nun la ŝtatan agnoskon de la instrua laboro de AIS sen tuŝi ties internaciecon kaj sendependecon. Tiel eblas, ke AIS, aplikante detalan ekzamenregularon, agnoskas surbaze de prijuĝo fare de internacia komitato studojn kompletigitajn ĉe universitatoj aŭ aliaj altlernejoj per havigo de internacia sciencista grado: “bakalaŭro” (Bac.) post almenaŭ 2 - 3 jara studado, “magistro” (Mag) post almenaŭ 2 postbakalaŭraj studjaroj, “doktoro”(Dr.) kaj “habilita doktoro” (Dr.habil.) pro posta esplorklaboro. Tiuj titoloj estas akireblaj ankaŭ originale per studado kaj ekzameniĝo okazante grandparte ĉe docentoj de AIS.

La Fino de unua parto.

La aŭtoro de la artikolo “Imamo Ĥomejni, lumo en obskureco” kiu aperis en la antaŭa numero estis s-ro **Ali Aŝgar Kosári** el Kángaváro. Bedaŭrinde ni forgesis mencii lian nomon, kore pardonpetas,